**Esperanto servu la pacon!**

# A K T U A L E

Monata informilo de Sovetia Esperantista Junulara Movado

№9(24) Septembro 1975

## NIA MOVADO PROGRESAS

### Socialisma konkurado en 1974/75: rezultoj kaj komentoj

**Juĝu mem – rezervoj estas**

Nian laboron ni taksas per poentoj: dum la agadjaro 1972/73 la SEJM-kluboj kolektis 15.855 poentojn, dum la 73/74-a – 20.037, 74/75 – 25.625! La kresko estas respektive je 33% kaj 22%.

Sed ni senmaskigu la poentojn. Ni iĝis pli moviĝemaj – la tendarojn kaj aliajn renkontiĝojn partoprenis 1874 personoj ( kompare kun 1467 en la pasinta jaro la kresko estas je 22%), ni pli multe legas – estas abonitaj 2.374 revuoj (Kp – 1.560, 35%), ni vastigis la klerigan laboron – la prelegojn aŭskultis 16.200 aŭskultantoj (Kp – 10.200, 37%), la kluba vivo iĝis pli varia: okazis 174 eksterkunvenaj aranĝoj, vesperoj, ~~kkk~~kursoj (Kp – 104, 41%). Finfine la kluba membraro definitive superis milon kaj atingis 1212, ankaŭ la nombro de aktivuloj kreskis de 459 ĝis 541.

Atenta leganto certe rimarkis, ke la kresko de la laboro grandparte estis mekanika: ni faris pli multe, ĉar ni estiĝis pli multaj. Jen pasintjare la aktivulo havis meze 43,6 poentojn, nun – 47,5; la kresko nur je 8,8%. Ni ne miru do, ke post la vasta dorso de la meza aktivulo kaŝiĝas eĉ 25 kluboj, kies aktivuloj havas pli modestajn atingojn. T a m e n , la 558 poentoj, kiuj sufiĉis en la 1974-a por atingi la laŭdatan 10-n lokon en la socialisma konkurado, nun sufiĉis por pretendi ... la 18-an. Probable por eniri la dekopon en 1976 estos bezonata laboro je 1000 poentoj. Konklude: ni plenumas ĉiam pli grandan laboron, preskaŭ ĉiuj ( en tiu "preskaŭ" kuŝas nia rezervego).

**Kiel kaj kial aŭ temaro por artikoloj**

Por pli "pezaj" atingoj ni transprenu sperton de avangardulo j. La rekordojn en apartaj aktivecoj mi malkovris nur posttendare. La rekordulojn ni pridemandu foreste, ĉu bone?

Plej multe "gastis" ufanoj (vidu la tabelon). Kiel ili altiras la homojn? Cu amasa ofta veturado utilas (pruvu!)? Ufanoj ankaŭ pri publikaĵoj en sovetaj gazetoj rekordas. Kiel eblas trovi verkontojn? Cu ekzistas arto proponi artikolon al redakcio? Ktp.

La E-kluboj de Poltava kaj Ivanovo elstaras pro prelegado; ivanovanoj prelegas ĉefe al studentaro, poltavanoj – al gelernantoj, instruistoj. Estas klare, por efikeco la propagando devas esti celita, sed kiel la rekorduloj atentas la interesojn de tiuj grupoj? Prelegis 11 geivanovanoj kaj 7 gepoltavanoj (distingiĝis k-do Grigorenko kun pli ol 40 prelegoj). Kiel estis preparitaj tiom multaj prelegoj kaj prelegistoj?

Dum tiu jaro duobliĝis la kvanto de ekspozici(et)oj: de 42 al 96(!). Fervoris Poltava, Riga, Krasnojarsk kaj, kompreneble, Klaipeda (ilian filokartian ekspozicion vizitis 70.000(!) personoj). Interesajn ekspoziciojn aranĝis ustjkamenogorskanoj. Aliflanke 16 kluboj faris eĉ ne okazan ekspoziciet on. Konsilu al ili, kiel kaj kiel tion fari.

Kaj jen demando problema: kiel okazigi koncerton? Pasintjare okazis 29 koncertoj (fakte koncertetoj) al ĉ. 2500 spektintoj. Nun nur 13 al 1300. Eble poltavanoj ion konsilu, ili ja koncertis trifoje...

Ni malmulte parolas pri la kluba vivo. Kluba kunveno - kion inventi novan? Sed jen - la jaro havas 52 semajnojn, sed en Riga okazis 115 kunvenoj kun antaŭplanita programo! Kujbiŝev kaj Zaporoĵje nur po 3 tiajn sukcesis aranĝi... Riganoj, transdonu la sperton, kiel vi sukcesis tiel: kelkfoje kunveni eĉ trifoje semajne?!... Nu, evidente funkciis kelkaj paralelaj grupoj. Sed denove, kial kaj kiel? Komuniku la sperton. Novosibirskanoj, ankaŭ vi rakontu, kion vi faris dum viaj 22 eksterkunvenaj aranĝoj (vesperoj, ekskursoj). Kiel vi opinias, ĉu multe tio utilas?

Ankoraŭ unu temo por serioza artikolo: pri la suko de nia movado - kursfinintoj. Kiom da kursoj okazis, mi ne povas diri, mankis indikoj en la raportoj (interalie, kial ni ne notu apude kursgvidantojn same kiel prelegistojn?). Do jen - pasintjare diversajn kursojn finis 729 personoj, nun nur 565 ( la falo je 24%). Ufanoj! Malgraŭ ĉio la nobro 96 impresas. Konsilu, kiel organizi kurson? Kiel instrui, ke almenaŭ 30-40% da komencintoj finu.

Jen kiom da demandoj aperis, kaj demandadi eblas senfine.

<u>Leteroj, leteroj kaj ... banderoloj</u>

Malgraŭ la hejmaj zorgoj la kluboj ĉiam pli atentas eksterlandon. Neniu kontestos, ke progreso de la eksterlanda movado fortigas nian pozicion. Aliflanke, niaj aktivaĵoj akcelas la eksterlandajn kolegojn. Ĉio komenciĝas de informiteco. Ni iĝis pli diligentaj en la informado: en la eksterlanda gazetaro aperis 60 niaj publikaĵoj (en 73/74 - 35), la E-stacioj disradiis 23 niajn kontribuaĵojn (estis pasintjare 5).

Konsiderinde kreskis la kolektiva korespondado, ni jam havas 161 kolektivajn koresponligojn kun 22 landoj (estis 62 en 14). Antaŭen iris Leningrada klubo kun 60 kolektivaj ligoj en 21 landoj kaj Klaipeda - 22 en 11 landoj. Estus interese ekaŭdi de ili, kiel praktike ili organizas tiom abundan korespondadon kaj kiel utiligas la korespondaĵojn.

Ni jam scias, ke niaj eksterlandaj amikoj volonte helpas la klubojn per materialoj por ekspozicioj. Ekz. barnaulanoj tiel organizis du grandajn ekspoziciojn. Ankaŭ ni pli fervore ol iam reeĥas petojn de eksterlandaj grupoj: estis forsenditaj 263 kontribuaĵoj, inter ili 76 banderoloj.

Estas agrable konstati, ke rimarkinde kreskis la individua korespondado - de 1266 ligoj en 41 landoj (73/74) ĝis 2374 en 48 landoj (la kresko - 46%). Tamen, se oni en ĉiuj kluboj tiel korespondus kiel ĉe la okopo de centuloj (vd. la tabelon: 8 kluboj havas ne malpli ol 100 ligojn), se estus tiel, SEJM havus 8090 individuajn ligojn!

Vin certe interesas, kun kiuj landoj ni plej multe korespondas (por eventuale "ĉasi" pli maloftajn landojn aŭ eĉ tute novan). Jen estas ili kune kun la kvanto de ligoj: Pollando - 389, Bulgario - 290, GDR - 207, Jugoslavio - 97, Rumanio - 93, Italio - 61, Francio - 61, FRG - 56, Japanio - 56, Svedio - 52, Nederlando - 51, Finnlando - 48, Britujo - 44, Usono - 41, Kubo - 39, Aŭstrio - 36, Aŭstralio - 29, Hispanio - 28, Belgio - 24, Danlando - 23, Novzelando - 18, Brazilo - 17, Norvegio - 14, Vjetnamio - 13, Mongolio - 11, Kanado - 11, Svislando - 10, Argentino - 10, Sudafriko - 5, Portugalio - 4, Islando - 4, Grekio - 3. Po 2 ligoj estas kun Angolo, Izraelio, Kolombio, Meksiko, Turkio, Urugvajo; po 1 ligo kun Andoro, Bangladeŝo, Irlando, Kamboĝo, Luksemburgio, Monako,

| Loko | E-klubo de urbo | Membroj/aktivaj | Poentoj | | Publikaĵoj en sovetaj gazetoj | | Prelegoj/aŭskultintoj | | Ligoj individuaj/landoj | | Kursfinintoj | | Publikaĵoj en eksterl.gaz. | | Partoprenis gaste, pers. | Vesperoj, ekskursoj | Abonitaj revuoj |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | Sume | Aktiv. | 74/75 | 73/4 | 74/5 | 73/4 | 74/5 | 73/4 | 74/5 | 73/4 | 74/5 | 73/4 | | | |
| 1 | 2 | 3 | 4 | | 5 | | 6 | | 7 | | 8 | | 9 | | 10 | 11 | 12 |
| 1 | Ufa | 37–22 | 2913 | 132 | 47 | 71 | 41/1523 | 16/500 | 30–12 | 42–9 | 96 | 142 | ~~37~~ | 12 | 118 | 4 | 192 |
| 2 | Riga | 25–15 | 1732 | 115 | 14 | 15 | 41/1367 | 43/1509 | 272–21 | 121–19 | 20 | 29 | 7 | 4 | 73 | 19 | 78 |
| 3 | Barnaul | 30–20 | 1674 | 84 | 3 | 3 | 30/947 | 20/1495 | 54–17 | 50–20 | 23 | 7 | – | 1 | 79 | 7 | 111 |
| 4 | Poltava | 76–38 | 1614 | 42 | 8 | 3 | 68/2586 | 11/260 | 52–27 | 22–5 | 41 | 34 | – | – | 55 | – | 42 |
| 5 | Klaipeda | 112–46 | 1402 | 35 | 3 | 22 | 7/236 | 11/259 | 388–37 | 435–38 | 30 | 39 | 1 | 4 | 24 | 20 | 122 |
| 6 | Vilnius | 38–13 | 1363 | 105 | 2 | 16 | 6/640 | 8/246 | 125–21 | 130–20 | – | 68 | 1 | 2 | 49 | 10 | 60 |
| 7 | Ivanovo | 24–15 | 992 | 66 | 7 | 5 | 44/2810 | 26/648 | 50–15 | 30–10 | 25 | 46 | 2 | – | 102 | 8 | 137 |
| 8 | Ĥarkov | 30–19 | 825 | 43 | – | 1 | 5/222 | 5/180 | 100–11 | – | 29 | 26 | 1 | 1 | 34 | 12 | 140 |
| 9 | U-Kamenogorsk | 15–10 | 794 | 79 | 10 | 2 | 3/400 | 2/680 | 53–13 | 40–13 | 8 | 24 | 1 | – | 28 | 3 | 65 |
| 10 | Leningrad | 48–22 | 772 | 35 | 1 | 1 | 9/228 | 6/210 | 283–23 | – | 15 | 31 | – | – | 24 | 5 | 59 |
| 11 | Tiĥvin | 14–8 | 770 | 96 | – | 2 | 9/578 | 5/280 | 20–7 | 6–3 | – | 20 | – | – | 47 | 5 | 32 |
| 12 | Viljandi | 30–15 | 673 | 45 | 8 | 11 | 7/213 | 4/120 | 204–31 | – | – | 27 | 2 | – | 45 | 8 | 90 |
| 13 | Novosibirsk | 39–23 | 669 | 29 | 2 | 3 | 7/174 | 8/163 | – | 3–3 | 35 | 29 | 1 | – | 35 | 22 | 123 |
| 14 | Salavat | 12–6 | 662 | 104 | 13 | – | 2/72 | – | 19–7 | – | 6 | – | – | – | 11 | 1 | 27 |
| 15 | Omsk | 26–18 | 619 | 34 | 7 | 14 | 9/374 | 21/650 | 70–21 | 46–19 | 15 | – | – | – | 24 | 9 | 106 |
| 16 | Rostov-Don | 25–15 | 574 | 38 | 8 | – | 12/220 | – | 77–18 | – | 7 | – | 4 | – | 1 | 1 | 35 |
| 17 | Miass | 38–20 | 566 | 28 | 8 | 2 | 20/529 | 13/575 | – | 2–2 | 23 | 40 | – | – | 27 | 1 | 7 |
| 18 | Moskvo | 20–8 | 545 | 68 | 4 | 5 | 1/18 | 5/320 | – | – | 7 | 5 | 7 | 8 | 56 | – | 36 |
| 19 | Tjumenj | 5–5 | 541 | 108 | 6 | – | 27/1105 | – | 17–12 | – | 16 | – | – | – | 5 | 2 | 30 |
| 20 | Meĵdurečensk | 18–14 | 517 | 37 | 12 | – | 4/116 | – | 105–23 | – | 27 | – | – | – | 7 | 2 | 50 |

| 1 | 2 | 3 | 4 | 4 | 5 | 5 | 6 | 6 | 7 | 7 | 8 | 8 | 9 | 9 | 10 | 11 | 12 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 21 | Krasnojarsk | 41–25 | 503 | 20 | 3 | – | 4/730 | – | 50–12 | – | 25 | – | – | – | 17 | 1 | 29 |
| 22 | Kaunas | 59–15 | 414 | 28 | 1 | 3 | 5/200 | 2/105 | 46–16 | – | 9 | – | 1 | – | 42 | 1 | 57 |
| 23 | Talgar | 10–7 | 354 | 51 | 6 | 7 | 3/136 | 5/180 | 33–11 | 46–13 | 9 | 17 | 2 | – | 5 | 1 | 23 |
| 24 | Siktivkar | 32–8 | 352 | 44 | 4 | – | 3/193 | 1/70 | 24–9 | 1–1 | – | 2 | 5 | 1 | 11 | 2 | 14 |
| 25 | Kievo | 8–5 | 337 | 67 | 2 | – | 5/96 | 2/60 | 32–15 | 20–10 | 21 | – | 1 | – | 4 | 4 | 17 |
| 26 | Liepaja | 13–6 | 331 | 55 | – | – | 3/65 | – | 35–6 | 33–13 | 15 | – | – | – | 23 | 3 | 18 |
| 27 | Kujbiŝev | 14–6 | 321 | 54 | 3 | 3 | 3/120 | 3/85 | 13–4 | 1–1 | 13 | 9 | – | – | 8 | 2 | 84 |
| 28 | Tula | 25–15 | 302 | 20 | 1 | 3 | 4/120 | 2/100 | 15–6 | 4–3 | 21 | 19 | – | – | 9 | 7 | 28 |
| 29 | Ĉelabinsk | 15–5 | 297 | 59 | 6 | 3 | – | 2/74 | 27–8 | 34–7 | 5 | – | – | – | 14 | 2 | 41 |
| 30 | Ĥmelnickij | 31–11 | 260 | 24 | – | 2 | 2/80 | 1/67 | 65–10 | 58–18 | 12 | – | 2 | – | 8 | – | 23 |
| 31 | Birsk | 25–10 | 247 | 25 | 2 | – | 2/30 | – | – | – | 5 | – | – | – | 3 | 2 | 10 |
| 32 | Kapsukas | 7–4 | 221 | 55 | – | – | 4/141 | 1/40 | 5–5 | 5–4 | – | 1 | – | – | 10 | 2 | 6 |
| 33 | Kedainiai | 102–12 | 204 | 17 | – | 2 | – | – | 102–19 | – | – | – | – | – | – | – | 85 |
| 34 | Novomoskovsk | 12–3 | 203 | 68 | – | – | 4/138 | – | 17–11 | – | 15 | – | – | – | 8 | 1 | – |
| 35 | Tallinn* | 17–9 | 202 | 22 | – | – | 2/41 | – | – | – | 6 | – | – | – | 10 | 4 | 15 |
| 36 | Soĉi | 30–10 | 182 | 18 | – | – | 3/110 | – | – | – | – | – | – | – | 2 | – | 81 |
| 37 | Velikie Luki | 6–6 | 150 | 25 | 1 | 1 | 2/30 | – | – | 50–9 | 4 | 14 | 2 | – | 2 | – | 9 |
| 38 | Doneck | 10–5 | 150** | 30 | 3 | 4 | – | – | 25–13 | 39–15 | – | – | – | 2 | 4 | – | 61 |
| 39 | Zaporoĵje | 13–5 | 141 | 28 | – | | 4/60 | 6/180 | 63–15 | – | 13 | 10 | – | – | 14 | – | – |
| 40 | Maĥaĉkala | 20–10 | 135 | 14 | 2 | 4 | – | 6/290 | – | 16–5 | 5 | 65 | – | – | – | 3 | – |
| 41 | Sterlitomsk | # | – | | | 1 | – | 5/300 | | | -6- | 30 | – | – | | | |
| 42 | Taŝkent | | – | | | | | | | | | | | | | | |
| SUMME | | 1212–541 | 25625 | 47,4 | 207 | 207 | 399/16208 | 240/10206 | 2374–48 | 1265–41 | 565 | 729 | 60 | 35 | 1049 | 174 | 2043 |

*Laŭ duonjara raporto de la junulara grupo. (Nun aliĝis la tuta klubo).
**Forestis raporto pri la dua duonjaro.

R i m a r k o: La faktoj en la skribaj raportoj ne ĉiam koincidis kun la buŝaj en la Konferenco(Aŭt.).

**Kontribuo por science**

Ĝojigas nin la studentaro. L.Novikova el Miass defendis por kvine la diploman verkon "Etimologia analizo de internaciaj vortoj dum lecionoj de la rusa lingvo" (kun uzo de E-to). T.Bercis (Riga) en studenta scienc-teknika konferenco prezentis la studon "Esperanto kiel ilo de internacia interkompreniĝo". Studentino el Novosibirsk (en la kluba raporto la familinomo forestas) prezentis kurslaboron "Ekonomiaj demandoj de lingvaj baroj". P.Jegorovas (Vilnius) defendis la kursan studon "La internacia jura statuso de UEA".

Cio-ĉi rememorigas al ni, ke antaŭ 10-12 jaroj kronis sian studadon per pri-kaj peresperantaj diplomaj verkoj B.Kolker ("Problemo de internacia lingvo"), E.Ojasved ("Problema E-movado en Estonio"), V.Zlotnikova ("Romidaj elementoj en E-to"). Iliaj kvinoj estis la unuaj...

V.Ŝilas, eksaekretario de SEJM.

## POSTULOJ POR LA ELEMENTA ESPERANTO-KURSO

La elementa kurso konsistu proksimume el 20 lecionoj. Ĉe la fino la lernantoj devas firme posedi la elementan gramatikon kaj ĉ. 800 radikajn vortojn, en kies limoj ili devas interparoli pri difinitivaj temoj, legi, traduki kaj rerakonti tekstojn. Pri la gramatikaj konoj la opinioj preskaŭ ne diferencas. Kio koncernas la proponatan temaron kaj bazan radikaron - ili devas esti rigardataj ne kiel leĝo, sed kiel rekomendo, kaj povas esti ŝanĝataj en prudentaj limoj.

La parolaj temoj: Esperanto-leciono (klaso), familio (portreto), loĝejo, labortago, ripoztago, vojaĝo, sezonoj, renkontiĝo kun eksterlandano, urbo, manĝejo(manĝaĵmagazeno), universala magazeno, sporto, internacia korespondado, Esperanto-tendaro, ferioj.

La radikaro estas kompilita surbaze de statistikaj studoj, ĝi konsistas el 15 grupoj de proksimume samvaloraj radikoj. La sinsekvo de la vortgrupoj ne signifas, ke la studado de vortoj devas havi nepre la saman ordon.

1. En, Esperanto, esti, granda, kaj, kie, kiu, kun, la, li, mi, ne, ni, sed, sur, unu, vi, vidi.
2. Al, bona, ĉu, de, domo, du, ĝi, ili, jes, juna, ke, kio, knabo, labori, lerni, longa, ŝi, tago, tre.
3. Ankaŭ, bela, blanka, ĉambro, ĉe, demandi, diri, doni, el, havi, infano, interesa, lando, legi, multe, nova, nur, papero, patro, per, pli, povi, pri, respondi, skribi, stari, tablo, tie, tiel, tiu, tuta, vespero, voli, vorto.
4. Alia, ami, amiko, antaŭ, ĉiu, devi, fari, filo, frato, ĝis, hodiaŭ, instrui, iri, kara, kelkaj, kial, kiam, kiel, kien, kompreni, letero, libro, mano, manĝi, mateno, montri, objekto, ol, paroli, plej, pordo, post, preni, rigardi, scii, se, sen, si, sidi, strato, ŝati, tempo, tia, tial, tio, tri, urbo, veni, vivi.
5. Akvo, alta, aŭ, baldaŭ, ĉar, ĉio, ĉirkaŭ, da, danki, facila, familio, feliĉa, fenestro, fermi, fini, floro, hejmo, helpi, hieraŭ, inter, iu, kapo, kia, kiom, komuna, koni, kuŝi, mondo, neniam, nigra, nokto, nomo, nun, okulo, parto, piedo, resti, ricevi, ruĝa, sana, super, tiam, tien, varma.
6. Ankoraŭ, apud, atenta, bati, cent, ĉi, ĉiam, dek, deziri, dormi, dum, fojo, grava, ĝojo, gusta, homo, horo, jam, jen, kampo, kvar, kvin, lasta, loko, mil, mono, morgaŭ, morto, naŭ, nenio, neniu, nombro, oni, pensi, por, porti, proksima, studi, sub, trovi, viro.
7. Aero, afero, arbo, atendi, aŭskulti, bildo, blua, dika, for, gaja, io, je, kanti, klaso, komenci, levi, libera, mastro, mem, memori, meti, monato, nek, ok, okazi, pano, peti, plaĉi, rakonti, riĉa, sama, sendi, sep, ses, sinjoro, sola, sufiĉa, teni, tero, tra, trinki, tuj, vero, verda, vizaĝo.

8. Aĉeti, diversa, eĉ, fabriko, forgesi, ĵeti, kamarado, kontraŭ, koro, kuri, loĝi, lumi, lundo, maro, muro, nacesa, plena, plori, rapida, ridi, sekvi, semajno, silenti, suno, ŝipo, tamen, trans, tro, vetero, veturi.

9. Angulo, aŭdi, certa, ĉefa, ĉielo, daŭri, decidi, dekstra, dimanĉo, ekster, ekzemplo, esperi, fajro, fali, fero, flanko, halti, iom, ĵurnalo, kalkuli, koloro, korto, kvankam, lingvo, lito, maŝino, mezo, milito, monto, movi, nazo, nenia, ordo, pasi, paŝi, perdi, prepari, promesi, serĉi, tiom, tranĉi, trankvila, vagono, vesti, vojo, vojaĝi.

10. Absoluta, adreso, buŝo, celo, do, edzo, festo, freŝa, frua, frukto, haro, ia, inviti, ja, kajero, klara, kongreso, kosti, krajono, krii, krom, kuraĝa, lasi, leciono, majo, mardo, merkredo, minuto, muziko, ofte, oro, organizi, peco, persono, plezuro, plu, plumo, pro, profunda, promeni, propra, punkto, renkonti, rimarki, ripozi, rozo, sekundo, simpla, sufero, vento, viziti, voki.

11. Agi, aĝo, ambaŭ, anstataŭ, aperi, apetito, aŭgusto, bezoni, bileto, brili, ĉesi, ĉies, direkti, direktoro, doktoro, egala, erari, februaro, frapi, fraŭlo, glacio, glaso, hela, julio, junio, ĵaŭdo, korpo, kredi, kutimo, laca, linio, magazeno, marto, metalo, mola, momento, najbaro, naski, neĝo, pagi, partio, perono, pluvo, printempo, revolucio, somero, sukceso, supre, ŝajni, ŝtato, ŝtono, tabulo, tuŝi, vilaĝo, vintro, voĉo.

12. Aktiva, arto, aspekti, atingi, batali, besto, birdo, bordo, brusto, butero, centro, ĉie, danci, dato, doloro, ekonomio, fiera, fiŝo, flava, frazo, gasto, gazeto, historio, horloĝo, iam, industrio, informi, kapabla, kino, klubo, kolekti, kondiĉo, konduki, konstrui, kontenta, konversacio, kovri, kuraci, kurso, lakto, lampo, larĝa, laŭ, limo, manki, marŝi, matematiko, naturo, nenio, nenies, nul, ofico, okupi, opinii, plano, postuli, poŝo, prava, precipe, preta, preter, prezenti, pura, radio, rajto, raporti, regulo, revi, rivero, rondo, rompi, sako, salti, saluti, senti, septembro, serioza, sistemo, sporto, stacio, stato, stelo, tasko, timi, vendi, zorgi.

13. Amaso, aparato, aparteni, apenaŭ, aŭtomobilo, aŭtuno, babili, branĉo, brui, bruli, ĉevalo, ĉial, ĉiel, danĝero, diskuti, donaci, efektiva, elekti, esprimi, fama, flugi, frunto, grupo, herbo, kapti, kies, komitato, konsenti, konsili, kulturo, kvazaŭ, litero, literaturo, memoro, miri, nacio, neniel, nordo, novembro, onklo, ordinara, ordoni, pardoni, pezi, permesi, poŝto, praktiko, prezidi, proponi, regiono, rekomendi, sabato, sceno, soni, speco, subita, sudo, ŝanĝi, ŝranko, teatro, turni, utila, uzi, verki, viando.

14. Agrabla, ajn, akcepti, animo, arĝento, armeo, artikolo, staki, aviado, bruna, ĉapelo, ĉiom, decembro, des, dolĉa, etaĝo, etendi, fakto, fidela, fingro, folio, formo, fumo, griza, gvidi, honori, hundo, horo, ie, ien, inĝeniero, januaro, ju, justa, ĵus, karto, kaŝi, korekti, korespondi, krei, kreski, lago, leĝo, ligi, ligno, miliono, moderna, numero, observi, odori, oktobro, paĝo, paŭzo, po, reala, rekta, savi, socialismo, soldato, standardo, ŝlosi, tekniko, tiri, traduki, vasta, vendredo.

15. Aboni, afiŝo, almenaŭ, aparta, aprilo, asocio, aŭtobuso, avo, bani, bedaŭri, biblioteko, cigaredo, ĉemizo, ĉien, dokumento, dubi, ekzameno, elektro, estimi, fako, fakultato, fa~~bri~~, filmo, fremda, gaso, gimnastiko, gitaro, gratuli, gusto, ial, iel, ies, instituto, kafo, kilogramo, kilometro, kisi, koko, kolbaso, koncerto, kopeko, koverto, kreto, krokodilo, kuiri, lavi, luno, magnetofono, malgraŭ, maniero, marko, metro, naĝi, nenial, neniom, nepre, nu, nubo, okcidento, oriento, ovo, paco, pantalono, parko, pentri, pilko, pluraj, pomo, porko, prelego, profesio, provi, respubliko, rezulto, ripeti, robo, rublo, saĝa, sata, simila, soveta, speciala, spegulo, sperta, sukero, supo, ŝuo, telero, televido, tendo, tramo, trolebuso, universala, universitato, venki, volonte.

B.Kolker, estro de la Metodika fako de SEJM.

## VOĈO DE KRIANTO EN DEZERTO

En mia foresto oni elektis min kiel estro de la Historia fako de SEJM. Mi jam havas amaran sperton estri la Gazetaran servon, kiu laŭ mia peto estas likvidita. Do antaŭ ol doni mian konsenton mi volas diri jenon. Jam fariĝis malbona tradicio fari nenion inter SEJT-oj. Pro tio mi volas scii, ĉu efektive estas almenaŭ 8-10 dezirantoj sin okupi pri historiaj aferoj? Kiun celon mi starigus antaŭ la Historia fako? Unue, skribe rakonti pri la nova tempo en la sovetia junulara movado 1957-1975. La fontoj - niaj bultenoj kaj febla memoro de junulargvidantoj. Due, skizi la historion pri la jaroj 1917-57, fari tion, kion pigris fari niaj veteranoj.

Tamen mi volas demandi vin, amikoj, ĉu vi efektive bezonas la historion? Mi ne konvinkas vin, ĉar la afero estas libervola, kaj al ĝi devas veni homoj jam konvinkitaj. Pro tio mi atendas, ke sin anoncos personoj, dezirantaj labori - kompili la historion. Skribonte al mi laŭ adreso 117449 Moskva V-449, a.k. 325, indiku, kiujn librojn pri historio vi posedas, el kiuj fontoj vi ĉerpas faktojn. Mi volonte helpos al vi, redaktos la histori-laboron. Tamen sola mi tiun laboron ne faros - mi ne estas historiisto kaj havas aliajn E-okupojn.

Se dum tri monatoj mi ne anoncos pri la histori-plano en "A", do la fako ne ekzistas, kaj hodiaŭ vi aŭdis voĉon de krianto en dezerto. Tamen mi esperas je viaj reeĥoj.

A.Ĥarkovskij, estro de la Historia fako.

## NI HELPU AL BARNAULANOJ

Ĉi-artikolo, verŝajne, iom malfruiĝis, ĉar la demando estis pridiskutita jam dum la lasta SEJM-Konferenco kaj estis ankaŭ mencioj en "A" (vd. "A"-8(23) pp. 91 kaj 100). Temas pri kolektado de materialoj por la ekspozicio "Monumentoj al rusaj kaj sovetaj homoj eksterlande". Pri tiu-ĉi kolektado barnaulanoj okupiĝas jam delonge, sed la rezultoj dume ne bonas. La kulpo estas ĉies. Jam pli ol 3 jarojn antaŭe dum SEJM-Konferenco estis levita ĉi-demando, kaj oni akceptis decidon (buŝan) ĉiamaniere helpi al la laboro. Nun ni denove revenas al la sama demando, denove evidentiĝas maldiligenteco kaj nedisciplineco de SEJM-anoj. Sed fari tiukampe SEJM-anoj povas multon, ja ĉe ni estas korespondligoj (registritaj) kun pli ol 1500* personoj el 50 landoj. Se peti ĉiun korespondamikon helpi en la kolektado de la materialoj, ni rapide povas atingi la atendatan rezulton.

Do, mi ankoraŭfoje turnas min al ĉiuj legantoj de "Aktuale", kiuj havas eksterlandajn korespondantojn: bonvolu peti ilin pri kontribuo al la utila afero de la barnaulanoj. Fine mi petas vin ĉiujn reeĥi al la artikolo (almenaŭ per PK), skribinte vian opinion.

D.Cibulevskij, unua v/p de SEJM.

## MALLONGE PRI GRAVA AFERO

La listo de subtenantoj montras, ke multaj kamaradoj praktike subtenas la aferon. Ili montras sian konsciencon malgraŭ la "severaj" kondiĉoj de subtenantiĝo.

Dum agitado de novaj kandidatoj eble oni devus informi, por kiuj konkretaj celoj estas uzata la subtena sumo. Necesas popularigi aliajn iniciatojn, novajn formojn de materia subteno, ĉar ili, ne tre ofte, tamen aperas.

---

*La kvanto estas prenita el la pasintjara raporto de la Sekretario. Ĉi-jare la kvanto de korespondligoj estas ĉ. 2400 (vd. p.114).-R.

Sed ĉefe estas dezirinde, ke ĉiuj subtenantoj ĝustatempe daŭrigu sian subtenon. Kaj mi alvokas ĉiujn amikojn de Esperanto, niajn estimatajn veteranojn aliĝi al la komuna afero.
Ĉar la afero estas libervola, mi, ekzemple, por la 1976-a jaro sendis tridek rublojn.

V.Ĉernov (Kaluga).

UTILIGU EVENTOJN!

En iama SEJT dum disputo "Esperanto en preso" k-do A.Ĥarkovskij diris interalie:"Por ke en revuoj aperu interesaj artikoloj - f a r u e v e n t o j n." La slogano estas aktuala. Sed ĉi-tie mi volas akcenti la inversan momenton: plene uzu la eventojn (okazojn). Jen ekzemplo: multaj partoprenintoj de someraj tendaroj kutime sendas al lokaj redakcioj siajn impresojn. Multaj, sed ne ĉiuj. Tion necesas fari sendepende, ĉu la redakcianoj simpatias al esperantistoj aŭ ne. Kaj jen interesaj ekzemploj, kiujn mi nomus"Ĉena reakcio". Iam V.Zibenkes sendis al mi lokan revuon kun sia artikolo. Al la redakcio mi sendis mian dankemon, bondeziran leteron. Rezulte aperis nova artikolo kun titolo "Reeĥo venis el malproksimo". Ankoraŭ - al kaluga junulara gazeto mi demandis perletere pri la novaperinta vortaro de E.Bokarev. Verdire mi ne tre esperis pri io bona, tamen aperis artikolo kun kuraĝega titolo "Esperanto - lingvo de estonto". Al kelkaj geamikoj mi sendis po ekzemplero. K-do B.Kolker reeĥis al la redakcio, sendis novajn faktojn. Lia letero estis ankaŭ publikita en la sama gazeto. La "Ĉena reakcio" daŭriĝis, ĉar multaj legantoj sendis al la aŭtoro en Ufa sian konsenton studi Esperanton koresponde.
Ankoraŭ unu iom kurioza fakto. Mi ricevis numeron de la tula junulara ĵurnalo kun priesperanta informaĵo. (Interalie, la redakcio memstare titolis ĝin "Saludo, kamerado!" Nu, ne gravas.) Krom dankleteron al la sendinto mi skribis poŝtkarte ankaŭ rekte al la redakcio. Interalie, en la lingvo Esperanto. Certe, tio aspektis iom provoke, tamen mi speciale uzis precipe latinozajn frazojn. Ĵurnalistoj komprenos ilin sen vortaro kaj reale ekvidos simplecon, internaciecon, b e l e c o n de la lingvo Esperanto.
Do, kamaradoj, faru eventojn, sed ankaŭ utiligu ilin centprocente.
Fine mi volas diri: multaj gazetoj favoras al esperantistoj, ofte eĉ sen nia iniciato propagandas Esperanton. Ni estu dankemaj. Antaŭ grandaj festoj, okaze de la Tago de preso ni nepre gratulu niajn favorantojn, sendu al lokaj kaj aliaj redakcioj varmajn esperantistajn salutojn kaj bondezirojn.

V.Ĉernov (Kaluga).

HONORAJ AKTIVULOJ DE SEJM

Ĉi agadjaro por SEJM estas aparte signifa, ĉar nia movado fariĝas dekjara. Tial por marki tiun ĉi jubilean jaron de SEJM la Komitato decidis enkonduki kategorion "Honora aktivulo de SEJM", elekto de kiuj efektiviĝos dumjare. Por elekti honorajn aktivulojn la SEJM-Komitato ellaboris jenan proceduron. Proponi kandidatojn por la kategorio "Honora aktivulo de SEJM" rajtas ĉiuj membroj de la SEJM-Konsilantaro, nome: komitatanoj, fakestroj, SEJM-reprezentantoj de ĉiuj kluboj. La lastaj koordinu la proponojn kun sia klubo. Por la proponotaj personoj estas starigataj jenaj kondiĉoj:

1. Aktivado en la SEJM-skalo ne malpli ol dum 5 jaroj.
2. Partopreno minimume en 3 SEJM-Konferencoj aŭ 3 SEJT-oj.
3. Aktiva kontribuado al SEJM-informiloj ("Juna Esperantisto", "Akordo", "Aktuale").

Do, proponoj pri la kandidataj (familinomo, nomo, patronomo), kiuj konformu la supremenciitajn postulojn, atingu la v/p de SEJM pri sekretariaj aferoj ĝis la 1-a de januaro 1976. La liston de kandidatoj trafos nur tiuj personoj, kiuj estos proponitaj de ne malpli ol 3 proponrajtaj personoj. La kvanto de proponoj por kandidatoj ne estas limigata. Al ĉiu kandidato mi sendos enketon de la balotiĝo, kiun plenigitan mi ricevu ĝis la 1-a de marto 1976. Post tio mi kompilos definitivan liston de kandidatoj, kiuj konsentis balotiĝi por la kategorio "Honora aktivulo de SEJM", kaj en voĉdonilo dissendos ĝin al ĉiuj membroj de la SEJM-Konsilantaro por voĉdoni. Unu persono rajtas voĉdoni por ne pli ol 10 personoj el la listo en la voĉdonilo. Ĝis la 1-a de majo la voĉdoniloj revenu al mi kun rezultoj de la balotado. En la junia numero de "Aktuale" la 10 personoj, kiuj gajnos la plej grandan nombron de voĉoj, estos anoncitaj esti Honoraj aktivuloj de SEJM.

Aktive partoprenu tiun-ĉi jubilean aranĝon de SEJM! Sendu la proponojn al la v/p de SEJM pri sekretariaj aferoj:

232054 Vilnius-54, Saulétekio aléja,29-25, Litova SSR, P.Jegorovas.

P.Jegorovas (Vilnius).

LABORPLANO DE LA SEJM-KOMITATO
por la jubilea 1975/76-a jaro

| Nº | Aktiveco | Respondeculoj | Dato |
|---|---|---|---|
| 1 | Organizi elekton de honoraj aktivuloj de SEJM | P.Jegorovas, V.Ebel | Dum la jaro |
| 2 | Daŭrigi la konkurson pri projekto de SEJM-insigno kaj produkti surbaze de la elektita projekto insignojn | V.Ebel, A.Melnikov | Dum la jaro |
| 3 | Sendi artikolojn kaj fotojn pri SEJM al eksterlandaj ĵurnaloj | V.Arolovič, D.Cibulevskij | Ĝis la 1-a de januaro |
| 4 | Prepari prelegon pri la jubileo de SEJM kaj dissendi al regionaj renkontiĝoj | V.Arolovič, M.Bronŝtejn | Ĝis la 1-a de nov. |
| 5 | Prepari retrospektivan eseon pri SEJM | P.Jegorovas (V.Ŝilas) | Ĝis la 1-a de marto |
| 6 | Kompili liston de anoncitaj SEJM-delegitoj kaj aperigi ĝin en "A" kaj eksterlanda gazetaro | D.Cibulevskij, V.Ebel | Ĝis la 1-a de marto |
| 7 | Organizi renkontiĝon de la prezidanto de TEJO F.Szabó Felsö kun SEJM-aktivuloj (en Moskvo) | V.Arolovič, D.Cibulevskij | Oktobro |
| 8 | Organizi kolektadon de ekspoziciaj materialoj pere de internacia korespondado | D.Cibulevskij, V.Ebel | Dum la jaro |
| 9 | Publikigi en "Aktuale" artikolojn pri agaddirektoj de ST kaj SE fakoj | N.Cvileneva, V.Ebel | Ĝis la 1-a de januaro |
| 10 | Ellabori projekton de nova SEJM-Regularo kaj publikigi ĝin en "Aktuale" | P.Jegorovas, V.Ebel | Ĝis la 1-a de aprilo |
| 11 | Aperigi en "Aktuale" direktivan mamaterialon por leterkontaktoj kun oficialaj instancoj | V.Arolovič, V.Ebel | Ĝis la 1-a de novemb. |
| 12 | Aperigi en "Aktuale" liston de fakaj laborgrupoj | N.Cvileneva, V.Ebel | Ĝis la 1-a de nov. |

(Daŭrigo)

| Nº | Aktiveco | Respondeculoj | Dato |
|---|---|---|---|
| 13 | Prepari alvokon por subteno de SEJM kaj proponi ĝin por dissendo kun "Amikeco" kaj aliaj informiloj | P.Jegorovas | Ĝis la 1-a de decembro |
| 14 | Prepari instrukcian leteron por subtenantoj | P.Jegorovas | Ĝis la 15-a de oktobro |
| 15 | Reeldoni Sekretarian libron | P.Jegorovas | Ĝis la 1-a de novembro |
| 16 | Kontroli preparadon de SEJT-18 | V.Arolovič, M.Bronŝtejn | Dum la jaro |

La plano estas ellaborita surbaze de la Decidoj de la IX-a Konferenco de la SEJM-Konsilantaro.

## ENCIKLOPEDIO DE SEJT-17

ADIAŬA VESPERO
Okazis la 17-an de aŭgusto. Oni anoncis la rezultojn de elekto de Miss kaj Mister Esperanto-75. Tiuj estis respektive L.Novikova (Miass) kaj V.Samodaj. La adiaŭado kun ludoj, kantoj kaj dancoj daŭris ĝis la matenaj krepuskoj.

BIBLIOTEKO
Ĝi enhavis 47 librotitolojn. Estis 25 aktivaj legantoj, kiuj uzis 48 librojn. La bibliotekon estris L.Radjuk (U-Kamenogorsk), helpis L.Berdnikova (Ĉelabinsk), N.Černova (Barnaul), V.Borodina (Barnaul), N.Maticina (Barnaul).

E-BUTIKO
Estis organizita kaj gvidata de Klaipeda E-klubo. La butikon estris J.Norvilaite. En vendo estis E-libroj, E-insignoj, stampiloj, klubaj kaj tendaraj emblemoj ktp.

ĈEBALTIA VESPERO
Okazis la 10-an de aŭgusto. La koncerton partoprenis reprezentantoj de la urboj Vilnius, Klaipeda, Liepaja, Šiauliai, Riga. Post la koncerto sekvis litovaj naciaj ludoj kaj dancoj.

DEĴORADO
Pri la tagordo zorgis B.Panjŝin (U-Kamenogorsk); la kuirejon estris V.Ĉemborisov(U-Kamenogorsk).

E-UNIVERSITATO
Rektoro - A.Melnikov (Rostov-Don). Ĉi-jaree estis nur unu kurso de la Universitato.
La prelega konsisto de la kurso:
1. Esperanto en scienco - A.Gonĉarov (Barnaul), 10.08.75.
2. UEA - B.Kolker (Ufa), 11.08.75.
3. Fakaj E-organizaĵoj - V.Ŝilas (Vilnius).
4. Jura E-Asocio - P.Jegorovas (Vilnius).
5. Metodoj de kluba laboro - V.Ŝilas, 13.08.75.
6. SEJM - V.Arolovič (Moskvo), 15.08.75.
7. Esperanto kaj lingvistoj - V.Kulikov(Omsk), 16.08.75.

FAKAJ KUNVENOJ
Respondecis A.Kogan (Tiĥvin). Okazis fakkunvenoj de radioamatoroj, instruistoj, de bibliografia fako.

FESTO DE NASKIĜINTOJ
Okazis la 11.08. La organizan laboron faris reprezentantoj de Ivanovo kaj Miass. La programon gvidis V.Ŝilas. Oni celebris 13 naskiĝintojn.

GIMNASTIKO MATENA
Okazis ĉiumatene. Gvidis V.Ŝilas.

INTERKONATIĜA VESPERO
La vespero estis organizita de ufanoj. La programon gvidis N.Korĵenevskaja kaj M.Gilinskij. Ĉiuj urboj prezentis sin en ŝerca maniero, kaj la plej konataj SEJM-anoj aldone ricevis de ufanoj po porcio da humura saŭco en kanta formo.

INTERPRETISTA KONKURSO
Okazis la 15.08, respondecis V.Samodaj. La konkurson partoprenis 12 homoj. La unuajn tri lokojn okupis:
1. A.Gonĉarov.
2. N.Cvileneva (Ufa).
3. G.Fomenko (Ufa), P.Jegorovas.

KONKURSO de GAJAJ kaj SPRITAJ (KGS)
Okazis inter la tradiciaj teamoj de Okcidento kaj Oriento. La teamon de Okcidento eniris A.Kogan (Tiĥvin) - kapitano, V.Ŝilas, D.Cibulevskij (Ĥarkov), S.Smetanina (Ŝuja), T.Bercis (Riga), V.Arolović, M.Urbanaviĉiute (Vilnius). La Orientan teamon eniris B.Kolker - kapitano, A.Kalaŝnikov (Tjumenj), V.Opletaev (Tjumenj), V.Sapoĵnikov (Krasnojarsk), L.Novikova, N.Cvileneva, M.Gilinskij, V.Ŝiŝkin (Barnaul). En la konkurso gajnis la teamo de Okcidento. La programon gvidis T.Legkova (Kujbiŝev) kaj A.Skiezgielas (Vilnius). En la ĵurio estis P.Jegorovas, A.Gonĉarov, B.Panjŝin, G.Fomenko,

KOMITATO TENDARA
En la komitato estis sekvantaj personoj: D.Cibulevskij, N.Cvileneva, B.Anoĥin (U-Kamenogorsk), B.Panjŝin, R.Citlau (U-Kamenogorsk), L.Brjuĥanova (U-Kamenogorsk), A.Gonĉarov, V.Ŝilas, A.Kogan.

LUMBILDA VESPERO
Estis montritaj sekvantaj serioj de lumbildoj: "SEJT-16", "Muzo-74", "El la vivo de E-klubo en Meĵdureĉensk", "El la vivo de Vilniusa E-klubo", "Ignolina bosta marŝo". Pri la vespero respondecis V.Sapoĵnikov.

MITINGO
Estis dediĉita al la 30-a datreveno de la Granda venko. La mitingon gvidis T.Loskutova (Ivanovo) kaj A.Kogan. Kun rememoroj pri la milita tempo elpaŝis V.Kulikov, rakontinta pri sia milita vojo de Irtiŝ ĝis Visla, T.Koptjaeva (Miass), V.Noĉovkin (Poltava), G.Gercikov (Talgar). De la junularo kun responda parolo elpaŝis A.Kalaŝnikov.

NEPTUNFESTO
Okazis la 13.08. Neptun - A.Skiezgielas. La ĉefdiabloj - G.Gercikov, E.Perevertajlo (Taŝkent), V.Sapoĵnikov.

OKCIDENTA VESPERO
La koncerton partoprenis reprezentantoj de la urboj Ivanovo, Moskvo, Riga, Kolomna.

ORIENTA VESPERO
Okazis la 12.08. Al la koncerto kontribuis E-istoj el Ufa, Tjumenj, Novosibirsk, Miass, Krasnojarsk, Barnaul, Omsk.

PAROLIGAJ KURSOJ
Respondecis A.Gonĉarov. Laboris 5 grupoj, kiujn gvidis E.Perevertajlo, V.Noĉovkin, B.Kolker, G.Cejtin (Leningrad), V.Kulukov (Omsk). Pri la metodiko de instruado zorgis B.Kolker.

PIEDMARŜO
Okazis supreniro al la montpinto, kiun gvidis V.Ŝilas.

POEZIA VESPERO
Okazis ĉe la fajro. Estis deklamitaj originalaj kaj tradukitaj poeziaĵoj ankaŭ propraj versoj.

PRELEGEJO SOMERA
Okazis 2 prelegoj:
1. Familiaj leĝoj - P.Jegorovas, 12.08.
2. Kalkulmaŝinoj kaj Esperanto - G.Cejtin (Leningrad), 13.08.

PRELEGO POR PIONIROJ
Okazis por anoj de surŝipa pionira tendaro. Ĉeestis 140 homoj. En la prelego partoprenis V.Kazanova (Barnaul), B.G.Kolker, B.B.Kolker (Ufa), Peŝĉenko Olja (Omsk), Iluĉjo Gercikov (Talgar), Ljovo Perevertajlo (Taŝkent), V.Ebel (Barnaul). Post la prelego okazis negranda koncerto, kiun prezentis V.Ŝilas kaj N.Cvileneva kun koncerta grupo el Miass kaj Tjumenj.

REGIONAJ KUNVENOJ
Okazis la 9.08, respondecis M.Belogolovskij (Doneck). Okazis kunvenoj de la Ĉebaltia, Centro-Rusia, Volgo-Uralia kaj Okcident-Siberia kun Mezazio regionoj.

SOLENA MALFERMO de SEJT-17
Okazis la 9-an de aŭgusto. La tendaron malfermis la Prezidanto de SEJM V.Aroloviĉ. Sekvis salutparoloj de ĉiuj urboj kun enmanigo al la mastroj de donacoj. De la UEA-Komitato parolis B.Kolker, de la TEJO-Komitato A.Gonĉarov. La verdan tendaran standardon hisis B.Anoĥin kaj J.Norvilaite, samtempe la tendaran fajron ekbruligis R.Citlaŭ kaj L.Brjuĥanova. De la Hobo-Mastro parolis B.Anoĥin. La malfermon gvidis V.Jakovlev (Barnaul).

TRADUKISTA KONKURSO
Por la konkurso estis proponita rakonto de K.Paustovskij "Kordo". La unuajn tri lokojn gajnis respektive B.Kolker, N.Cvileneva, A.Gonĉarov.

TRADUKISTA KURSO
Estis gvidata de V.Samodaj, funkciis ĉiutage.

VERDA POLICO
La estro de la Verda polico estis V.Sporyĥin (Tula).

La materialojn kompilis V.Kazanova (Barnaul).

## Informoj * Anoncoj * Petoj * Sciigoj

La SEJM-Komitato anoncas daŭrigon de la konkurso je projekto de SEJM-insigno. La insigno devas esti originala, bela, plurkolora kaj simboli la celon de E-movado kaj de SEJM. La aŭtoro de la plej bona projekto estos premiita. Bv. sendi viajn projektojn kolore plenumitajn sur papero al la Redakcio de "Aktuale", indikinte la proponatajn dimensiojn de la insigno, ankaŭ proponu materialon por la insigno: metalo, vitro, ligno ktp.

* * *        * * *        * * *

DONECK
En la unua kvaronjaro de 1976 la eldonejo "Nauka" eldonos libron "Problemi interlingvistiki (tipologija i evolucia meĵdunarodniĥ iskusŝtvenniĥ jazikov)". Indikon pri ĝi vidu en la templano de la eldonejo (unua volumo) №348, p. 106. La eldonkvanto de la libro - 10 000 ekz., ĝi kostos 50 kop.

El "Meĵdunarodnaja kniga" venis letero kun la sciigo, ke "nuntempe la kompetentaj planaj organoj okupiĝas pri konsidero de la demando pri enigo de E-literaturo en eksterajn komercajn kontingentoj al la sekva kvinjaro."

Klubgvidantoj! Ne forgesu skribi viajn konkretajn proponojn al "Komitet po delam izdatelstv...". Vd. la adreson № 15 en "A"-10(14), p. 92.

---

Redaktis V.Ebel.    Redakcio: 656099 BARNAUL-99, abon. k. 11.